

La Karavelo

Beletra Esperanto-Revuo pri la Portugallingva Literaturo

n-ro 011
sept. / okt. 2008

Fondita de João José Santos, en Portugalio, en oktobro 2007



En simila navo, la portugalia reĝo Don Sebastiano, en 1578, foriris por ĉiame en la batalon de Alkasero Kibiro (norde de Afriko).

am vriguedemace do Saluado

Legu la poemon de Fernando Pesoo sur la paĝo 5.



bildo el la libro *Memória das Armadas* (ĉ. 1550)

la navoj pli grandis ol la karaveloj, porteblis pli da komercaĵoj kaj ebligis pli stabilan navigadon

La Karavelo n-ro 011 sept.-okt. 2008



- | | | |
|---|-------------------------|--|
| 1 Kovrilo: Portugala navo | El la redakto | |
| 2 Enhavo – Kolofono | El la redakto | |
| 3 Ĉu vi lernas la anglan por studi esperantaj fakojn? (eseeto) | João José Santos | |
| 5 Fernando Pessoa (poezio)
Mesaço (30-a) | João José Santos | |
| 6 Komodiano (poezio)
La kolero de Dio | Gerrit Berveling | |
| 7 Włodzimierz Zagórski (poezio)
Historio pri praulo Noa | Edward Jaśkiewicz | |
| 8 Poezio:
Finfine... paco!
Graveco de sengravulo | EdNov | |
| 9 Rakonto: Televido | João José Santos | |
| 11 Rakonto:
Miaj unuaj spertoj pri televido | Leo De Cooman | |
| 12 Poezio:
El kaoso en harmonion | Nikolaj Nečev | |
| 13 Poezio:
Ĉastuŝkioj | Valentin Melnikov | |
| 13 Poezio:
Mi atendis vin | Imre Szabó | |
| 14 Machado de Assis (rakonto)
Kiel oni inventis almanakojn | Paulo Sérgio Viana | |
| 16 Teatro:
Fraŭlino Lunalum' | Luiza Carol | |
| 18 Artur Azevedo (rakonto)
La naztuketo | Roger de Castro Gotardi | |
| 19 Resumo de Prelego:
24-a RPE, en Alkoŝeto, Portugalio
Esperantaj nomoj elvenantaj el la portugala | João José Santos | |
| 24 Fotoraporteto: Alkoŝeto, Esperanto-gastama urbo | João José Santos | |

La Barko: La artikoloj enhavantaj la bildon estas la plej facilaj por komencantoj. Uzu ilin por plibonigi vian lingvonivelon, aŭ tiun de viaj lernantoj. La vortoj de la artikoloj enbarkigitaj nur estos englosigitaj se ili ne aperos en la Reta Vortaro: <http://www.reta-vortaro.de/revo/>

Responso: Pri ĉiu artikolo, ties gramatiko, enhavo, stilo kaj vortprovizo responsas la koncerna aŭtoro.

Al blindaj homoj: Kunlaboru bv. por plibonigi la legadon de La Karavelo far blindaj homoj.

Uzado de tekstoj el La Karavelo: Ne uzu tekstojn el La Karavelo en alia publikaĵo, sen peti permeson de nia redakto.

Havinte permeson por uzi la tekstojn, ĉiam indiku la fonton. Ekz.: El la revuo "La Karavelo", n-ro 9, junio 2008, paĝo 5 ĝis 8.

Kolofono

Konstantaj verkistoj...

Eduardo Novembro
Edward Jaśkiewicz
Francisco Stefano Wechsler
Geraldo Mattos
Gerrit Berveling
Imre Szabó
Irina Mironova
João José Santos
Leo De Cooman
Luiza Carol
Nikolaj Nečev
Paulo Sérgio Viana
Roger de Castro Gotardi
Tibor J. Szabadi
Valentin Melnikov

Direktas, redaktas, kompostas

João José Santos
Asistanto pri dramo
João Pereira dos Santos

Reviziistoj

Imre Szabó
Kurt Fischer
Luiza Carol - pri La Barko
Roger de Castro Gotardi
Valentin Melnikov

Telefono (+351) 268 919 000

Poŝtel. (+351) 960 13 15 15

Retadreso lakaravelo@gmail.com

Retejo www.esperantopt.com

Adreso

LA KARAVELO – Dr. João José Santos
Fonte Velha, caixa 3003
7100-078 Estremoz – Portugal

Recenzeblaj libroj

estu sendotaj al la supra adreso.

Reguloj

Pri la principoj, labormaniero kaj reguloj de La Karavelo, nepre elŝutu kaj legu la dosieron **Regularo de La Karavelo**, el la ĉefa paĝo de nia retejo. Ĝi estas konstante aktualigata.

www.esperantopt.com

libera softvaro
© João José M. Q. dos Santos



Foto: João José Santos

Ĉu vi lernas la anglan por studi esperantajn fakojn?

de João José Santos



ENKONDUKO

Kiam la futbalaj teamoj estas premataj de tempomanko aŭ de malbonaj rezultoj, kelkfoje la strategion anstataŭas la kiĥotaj iniciatoj de kelkaj futbalistoj, kiuj provas, per si mem, solvi la ludon. Aliffoje, la teamo atakas hazarde, senlogike, baraktante por la venko. Do, kiam mankas strategio, oni faras ĉion ajn por atingi la rezultojn ne atingitajn eĉ per bona strategio. Kelkfoje, la individuismaj agoj solvas la ludon, aliffoje ne. Kelkfoje eĉ nelogikaj atakoj enĵetas la necesan golon por gajni la ludon, aliffoje ne. **Sed, neniam teamo venkas la ludon, ŝotante en sian propran golejon.**

NIA STRATEGIO

Dum 121 jaroj, la esperantistoj provis avanci cele al ĝenerala agnoskado, ke esperanto estas la solvo por la internacia komunikado, uzante diversajn metodojn. Oni kutimas enklasigi tiujn metodojn laŭ desubismaj metodoj kaj desuprismaj metodoj. La ununura desuprisma venko, kiun esperanto daŭre ĝuas, estis la agnosko far UNESKO, danke al la laborado, i.a., de Ivo Lapenna. Aliaj apenaŭaj desuprismaj sukcesoj venis kaj mortis. Nur la desubismaj metodoj donas la bazan forton, por ke UNESKO daŭre agnosku la valoron de esperanto kiel internacia lingvo. Do, post 121 jaroj, kion esperanto havas en la mondo? Esperantistan komunumon, renkontiĝojn kaj kongresojn, naciajn kaj internaciajn organizojn, retpaĝojn kiuj montras ĝian internacian kulturen forton, filmojn, videojn, muzikojn kaj – plejgrave! – librojn kaj gazetojn. Fakte, kiam la desupristoj pensas, ke estus strategie adekvate elspezi tempon, homfortojn, monon kaj energion, por konvinki la politikistojn enkonduki esperanton ien, ili naive eraras diversmaniere:

1. ili ne komprenas, ke tio, kio restas, post 121 jaroj da laboro, estas la desubismaj agoj;
2. ili ne komprenas, ke la politikistoj nur interesiĝas pri povo, mono, bonfamo kaj balotoj, kaj esperanto ne donas tion al ili;
3. ili ne komprenas, ke kulturaj novaĵoj ne enradikiĝas en la vivon de la homoj per dekretoj, sed per ĉiutaga enŝteliĝo en ĝin.

Tamen, ĉu vi tagmanĝos morgaŭ kun la prezidento de via lando? Do parolu al li pri esperanto! Uzu ĉiujn decajn metodojn je via dispono, sed ne forgesu, ke dum 121 jaroj, tio, kio pludaŭrigis esperanton, estis la abelara laboro de milionoj da homoj, kiuj, movitaj de l' amo al la sankta ideo, instruis, skribis lernolibrojn, verkis poemojn kaj svingis flagojn.

Esperanto venkos, sed ĝia venko estos laŭgrada, enŝteliĝante en la vivon de la homoj kaj de la socioj. Ne per dekreto. **Tamen, por ke tiu venko okazu, la esperantistoj ne povas fari unu aferon: pafi siajn proprajn piedojn. Ĉu ni sukcesos ne pafi nin mem? Certe jes!**

NIA CELO KAJ NIAJ PRINCIPOJ

Nia celo, kvankam kelkaj esperantistoj ne kredas pri ĝia efektivigo, ĉiam estis tre klara: ke esperanto estu amase uzata por la internaciaj rilatoj, defendante la ekziston de la etnaj lingvoj. Tio ĉi estas ĝenerale akceptata de la esperantistaro kiel nia celo, aŭ pli poezie *nia revo*.

Unu el niaj principoj estas uzi esperanton ĉiam kiam eble, inter ni, kaj uzigi ĝin en la internaciaj rilatoj. Fakte, danke al tiu fundamentismo paroli ĉiam en esperanto inter ni, la esperantistoj uzas esperanton kiel naturan lingvon, sen baroj, plensukcese, kun esprimivo kaj kompetento, eĉ je alta nivelo, super la ĝenerala kompetento pri fremdaj lingvoj.

Kelkfoje, ni provas enkonduki esperanton kiel propedeŭtikan lingvon, aliffoje kiel ponto-lingvon, nu ĉiam zorgante, ke la lingvo estu uzata. **Unu el niaj plej gravaj principoj estas: oni uzu la etnan lingvon en la etna vivo, kaj esperanton en la internacia vivo.**

ESPERANTO KIEL STUDFAKO

Kompreneble, se oni nuntempe intencas studi la esperantan literaturon, la esperantan historion, la esperantan movadon aŭ iun ajn alian fakon pri esperanto, tiu homo devas lerni nian lingvon, ĉar la plej riĉa literaturo pri esperanto estas verkita en esperanto mem.


Fakte, ne sencus, ke la propraj esperantistoj, kiuj volas uzigi esperanton pli kaj pli, produkti priesperantajn studojn en aliaj lingvoj, sen esperanta versio. Tiuj studoj estas verkitaj en esperanto, kaj kelkfoje tradukataj poste alilingven. Per ĉi tiu metodo, uzata ĝis nia epoko, ni efektive uzas esperanton, kiel internacian kulturlingvon, por pritrakti niajn studojn rilatantajn al esperanto mem.

Kompreneble, oni ne postulu la tradukon al esperanto de disvastigaj flugfolioj, de bazaj gramatikoj, de lernolibroj, de disvastigaj videoj, ktp.

Tamen, la esploraj libroj pri esperanta historio kaj literaturo, i. a. fakoj, nepre devas aperi en esperanto. Male, la propraj esperantistoj ne povus disvolvi studojn pri tiuj fakoj, aŭ, por tio, devus lerni etnajn lingvojn, ĉefe tiujn plej uzatajn internacie kiel la anglan, la germanan, la kastilian kaj la francan. Antaŭlonge, la esperantistoj asertas, ke oni ne devas postuli de iu ajn la lernadon de fremdaj lingvoj por sukcese komunikiĝi kaj labori internacie. Por tio, ni proponas, ke ĉiu homo el nia planedo sciu sian etnan lingvon kaj esperanton. La lernado de aliaj lingvoj devas konstitui rajton, ne devon, de la homoj. Ne sencas do, ke ni mem postulu, ke la esperantistoj konu aliajn lingvojn por priesplori esperantajn temojn.

Evidente, ĉiu el ni estas libera homo, kaj rajtas skribi librojn en iu ajn lingvo, kun aŭ sen esperanta versio, sed ĉiu el ni ankaŭ rajtas opinii pri la laboro de la aliaj.

Tamen, neniu esperantisto farus tion. Neniu pafus sian propran piedon, neniu ŝotus en sian propran golejon. Kaj se iu, pro labora premeco tion farus, plej bonintence por enkonduki esperanton en la universitatan medion, per esperanta verko en la angla, certe tiu esperantisto hastus traduki la libron esperanten. ;)



Faksimilo de la bildo de *Historio de la Lingvo Esperanto* (1-a volumo) de Edmond Privat, evidente, verkita en esperanto.



Faksimilo de la bildo de *Esperanto en Perspektivo*, de Ivo Lapenna, evidente, verkita en esperanto.

www.esperantopt.com



Mesaço - de Fernando Pesoo

el la portugala tradukis João José Santos

11. LA LASTA NAVO (1)

En ĝi vojaĝis Don Sebastiano,
el ĝi leviĝis alte la standardo,
de la Imperio.
La lasta nav' foriris sub sun' fata,
sola, inter mistero veprofeta
kaj plora anksio.

Ne plu venis. Al kiu kaŝ-insulo
albordiĝis? Ĉu venos el nebulo
de l' sorto bedaŭra?
La korpon kaj la formon de l' futuro
Di' gardas, sed lumsendas ĝin, aŭguro
malluma, nedaŭra.

Ah, ju pli mankas al popol' l' animo,
des pli la atlantika mi-inklino
ekzaltas kaj transas.
En mi, en mar' sentempa kaj senspaca,
nebule mi figuron vian vidas,
malhele ĝi venas.

Mi ne scias la horon, sed stos horo,
kvankam ĝin Di' prokrastu, kaj l' animo
ĝin nomu mistero.
Subsune vi aperas min, malnubas:
kaj la standard' alte plu vin apudas,
de la Imperio.



Bildo el la libro *Memória das Armadas*
(ĉ. 1550)

Historiaj kaj aliaj klarigoj

La praavoj de Don Sebastiano (1554-1578) konkeris la portugalian teritorion al la hispanoj kaj al la maŭroj. Poste, per la maraj malkovroj, la portugaloj koloniis multajn teritoriojn, de Hindio al Brazilo. Movita de la ambicio gloriĝi kiel siaj antaŭuloj, Don Sebastiano ekspediciis al Alkasero Kibiro, en la nordo de Afriko. Tiu ekspedicio perdis grandan parton de la portugala nobelaro, kaj eĉ la reĝo senpure malaperis. Tiu okazo enĵetis la landon en la plej danĝeran politikan krizon. La portugaloj perdis sian sendependecon, favore al Hispanio, kies reĝo Don Filipo La Dua iniciatis la Trian Portugalan Dinastion, kiel portugala reĝo Don Filipo La Unua. Tio okazis en 1580. Nur en 1640, la portugaloj sukcesis denove repreni sian sendependecon ĝis la nuntempo.

La malapero de Don Sebastiano en tiel frua aĝo, ne postlasante idaron, kreigis kulturan

miton, kiu nomiĝas *sebastianismo*. Laŭ la mito, Don Sebastiano reaperos tra plennebula nokto, por solvi la problemojn de sia lando kaj de sia gento...

La verko *Mesaço* estas plena je esoteraĵoj. Malsamaj studentoj pri la verko, eĉ fakistoj, klarigas malsame la samajn strofojn. Konsekvence, la tradukisto devas postrestigi en esperanto ne nur la konceptojn sed ankaŭ la ambiguojn. La verko, kvankam unuavide eble ŝajnas havi nur historian dimension, havas amplekson religian, filozofian kaj esoteran. La aludoj al Dio ne limiĝas al kreda teniĝo, sed montras koheran spiritalan filozofion, laŭ kiu oni konceptas la rolon de Dio en la historio de la homaro.

La legado de la lastaj tri versoj de la poemo, i.a., povas konduki la leganton al interpretoj malpli oftaj, sur la kampo de la esoterismo, kio ne devas mirigi iun ajn, ĉar Fernando Pesoo praktikis astrologion kaj li mem tradukis teozofiajn verkojn.

(1) *Navo* – el la portugala *nau* [naŭ], malgraŭ la homonimeco kun la *navoj* de la preĝejoj. Tiel kiel en la aliaj lingvoj, esperanto ne povas nomi la diversajn ŝipojn malspecife per la ĝenerala nomo *ŝipo*.



Foto: Gerrit Berveling

el La Instruoj: I:2 - La Kolero de Dio **de Komodiano**

el la latina tradukis Gerrit Berveling

Komodiano devas esti la unua kristana poeto Latinlingva, kies versoj konserviĝis al ni. Kelkaj fakuloj supozas, tamen, ke li verkis nur en la 5-a jc, sed pli verŝajna estas la supozo, ke li apartenas al la 3-a jc.

Al ni restas de li du malsamaj verkoj: **La Instruoj** ampleksas 2 librojn kun entute 80 akrostiĥoj; la unua libro alvokas la paganojn konvertiĝi al Kristanismo; la 2a libro instruas kristanojn kaj kateĥumenojn. La heksametra **Apologia Kanto** aŭ **Kanto pri la du Popoloj** (1060 versoj) devas konvinki la paganojn. Al ili Komodiano prezentas la Eklezion kiel la Veran Izraelon.

Lia uzado de la heksametroj estas tre nekutima; li multe pli atentis la vortakcentojn ol la distingon inter longeco kaj mallongeco, kiel estis tradicie. Fakte liaj versoj ofte impresas nur kiel ritma prozo.

Leĝe¹ instruas la Dio de l' mondo, de l' tero, de l' maro:
Al senenhavaj Diaĵoj - Li diras - adoron ne donu,

Kiujn fabrikis el ligno kaj oro nur viaj manoj!
Oh! ke ne mia koler' neniigu vin ĉiujn pro tio!
5 Longe antaŭ Mose', senkultura, senleĝa la gento
En senscio adoris nur reĝojn delonge mortintajn²,
Revis ĉe ties bildoj pri vana forto idola.
Oni migrigis la Judojn el Egiptio; kaj Dio

Donis al ili la Leĝon, ke Lin ili solan adoru
10 En ĉiopovo - kaj tiujn ceterajn neniam do plue!

De Resurekto en tiu ĉi Leĝo eĉ estas instruo:
Iam denove vivi feliĉe eblas esperi -
Onte, sed nur se l' idolojn vanajn ili forlasos!

¹ T.e. en la Torao (libroj de Moseo).

² La malnova religi-kritiko asertis, ke efektive la nocio *Dioj* origine devenis de plu-adorado de praaj reĝoj post ilia morto. Vidu en Esperanto ankaŭ la verkon *La Nekonata Dio* de Ferenc Mócsi (trad. el la Hungara István Nagy; eld. Fonto 1988) kiu traktas parenkan temon tre originale.



Foto: Jaśkiewicz

**el la pola tradukis
Edward Jaśkiewicz**

Historio pri praulo Noa de Włodzimierz Zagórski

Praulo Noa la sanktul'
antaŭ l' Sinjor' iradis.
Timegis akvon l' mizerul',
vinon per kruĉ' drinkadis.

Tial lin amis la Sinjor'
kaj gardi lin promesis.
Dum komenciĝis diluvhor'
lin droni ne permesis.


Dum kvardek tagoj per pluveg'
teron l' Sinjor' punadis
kaj Noa el sub bareleg'
neniam eliradis.

Jene plu daŭras la homar'
kaj plu ĝi eterniĝas.
Sentenco de tio jena:
- drinkej' ne danĝeriĝas.

Pasis diluvo - Noa dank'
Javeon - ne suferis.
Por ne ekestu vino-mank'
(ĉar vinon li preferis).

El la malplena barel' for
deprenis Noa ringon
kaj ĝin oferis al Sinjor'.
Akceptis Di' distingon.

Kaj laŭ ĉi ringo (la simbol')
Li ĉielarkon faris.
Nun per diluv' - el propra vol' -
ne plu puni deklaris.



Ankoraŭ Noa vivis plu,
antaŭ Sinjor' iradis,
se lin obeis gamboj nur,
ĉar per la kruĉ' drinkadis.

Malbenis Noa akvon plu
kaj kvazaŭ fajron timis,
ĉar Dio punis per diluv'
la mondon, kiu krimis.

Sed iam ebriiĝis tro
praulo nia sankta,
arkeon iris dormi do
de Ĥam priridetanta

Tial malbenis Ĥamon Di'
treege ofendita.
Kaŭze de tio, ĝis nun li
jam estas malbenita.

Sentencon de l' ĉi histori'
ni klare povas vidi.
Pro Noa ja korporaci'
oni ne rajtas ridi.

Kiu priridas justan do
drinkante sen atento
tiu ja ebriiĝos tro
restante Ĥama gento.



Finfine... paco!

de EdNov

Politikistoj, militaristoj,
pafaĵ- plus armil- faristoj,
mortigo-komercistoj,
kaj similistoj
(la kutima kunfrataro),
senelireje el sia militaĉo
ja altruditaj ili ariĝas...

Ek, oni heroldas Pacon!

Oni kalkulas, en- kaj elkalkulas
pri- kaj rekalkulas
profitojn financajn
eĉ bankrotojn
(detalzorga librotenado);
respondecon pro tia sanga negoco
ja de ĉiufanke ili rifuzas...

Sed, oni heroldas Pacon!

Kiom da pafiloj, kanonoj,
da tankoj, ŝipoj, aviadiloj
plus aliaj detrupovaj maŝinoj
aliigitaj en ferrubon
(spuroj de neniiga barbaraĵo);
ankaŭ triumfojn kaj frakasojn
ja senemocie ili komputeras...

Jen, oni heroldas Pacon!



Graveco de sengravuloj

de EdNov

Sengraveco
estas grava por
negravuloj
kiuj gravigas
malgravecon
por iĝi gravaj
en sia
nulgraveco

P.S. - Interpunkciu laŭplaĉe

Pro deviga militĉesigo
delogcele al ĉiuj gentoj
ontan historian eventon
oni hipokrite profetas
(metia mensogularo);
kaj eĉ al pacpremio
ja aroge ili alcelas...

Plue, oni heroldas Pacon!

P.S.

Nu, kio pro la mortigitoj,
vunditoj, kripligitoj,
kaj funebrantaj gepatroj,
vidvinoj, georfoj,
la ĉiama viktimararo?
Per medalhonorigaj solenaĵoj
ja ĉiuj ili estos kronataj...

Tiam, oni heroldos Justecon!



Televido

de João José Santos

*Mi ne havas imagpovon, mi havas memoron,
memoron de tio, kion mi vidis,
de tio kion mi sentis, de tio kion mi spertis.*

Kamilo Kastelo Branko

(vidu ĉe La Karavelo, numero 2, paĝoj 15-17)

Bildo de indiano kun birdoj

Kiam oni sentas, ke kvin jardekoj da vivo jam estis formanĝataj de Krono, oni rememoras la antikvajn travivaĵojn, kun unika ĉarmo, kvazaŭ tiaj travivaĵoj estus relikvoj eskapintaj al la vorema apetito de la tempo-dio...

La televido estis aperinta en Portugalio en 1957, kaj mi naskiĝis en 1958. Kiam mi estis pli malpli ses jaraĝa, nur riĉaj lisbonaj familioj povis aĉeti televidon, kaj do mia familio tute ne povis ekhavi ĝin. Mi loĝis proksime de la kvartalo Karmo¹, kiu, en 1974, estiĝis la plej grava scenejo de la Dianta Revolucio, en la 25-a de aprilo. Proksime de tiu loko, estis naskiĝinta Fernando Pesoo², en 1888.

Kvankam loĝantaj en tre centra kvartalo de Lisbono, ni kaj niaj najbaroj estis ĝenerale malriĉaj, malmultaj havis kompletan tualetejon, kaj evidente la salajro ne sufiĉis por aĉeti la magian skatolon, kie belaj inoj estis savataj de kuraĝaj viroj. Tiam, ili ankoraŭ ne estis tiel muskolozaj kiel Arnold Schwarzenegger, sed ankaŭ iŝi ne havis la lipajn atributojn de Angelina Jolie. Certe la

leganto komprenas, ke la mirakloj de l' silikono ankoraŭ ne estis aperintaj...

Antaŭ 50 jaroj, la kvartalaj kluboj abundis en Lisbono. Ankaŭ ni havis la nian, kiu nomiĝis Sporta Klubo de Karmo³ (SKK). Ĝi ne plu ekzistas, kiel plejparto de tiaj lisbonaj kluboj. Kelkaj postvivis ĝis la 21-a jarcento, sed ili estiĝis asocioj, kie maljunuloj fumas la ceteran vivon dum kartludas.

Sporta Klubo de Karmo disvolvis la sporton en nia kvartalo, ĉefe la tablotenison, kiun mi miatepe ludis sufiĉe malbone, kaj poste disvolvis la ĵudon inter la junuloj. Mi estis unu el ili, tiam jam 16-jaraĝa, kaj la ĵudmajstro agnoskis mian talenton por tiu sporto. Aliaj gravaj agadoj estis disvolvataj de SKK. La plej plaĉa al la junulinoj estis la strataj baloj, okazintaj precize sub la fenestro de mia patrina avino, kie ni loĝis, kaj de kie mia kara avino kontrolis la paŝojn de la filinoj dancantaj kun la najbaroj.

Tamen, la plej grava iniciato de nia klubo okazis, kiam mi estis pli malpli 6-jaraĝa. Tiam ni estis en 1964, la usonanoj ankoraŭ ne estis irintaj al la Luno, kaj la portugalo ankoraŭ

1 Portugale Carmo.

2 Portugale Fernando Pessoa.

3 Portugale Desportivo Clube do Carmo.

ne estis kudrinta ilian flagon⁴. En 1964, *The Beatles* elŝipiĝis unuafoje en Usono. En 1964, Eŭzebo⁵ jam estis la plej rimarkinda futbalisto el Portugalio. Tiam, en 1964, Sporta Klubo de Karmo aĉetis televidon.

La vivo de la kvartalo ŝanĝiĝis. En la plej granda salono de la klubo, oni fiksis la aparaton en centra pozicio de la malplej granda muro. Oni ordigis simplajn lignajn seĝojn, kvazaŭ en kinejo, laŭ vicoj bone aranĝitaj, kaj jen ni kaj niaj najbaroj ekvizitis la sidejon de SKK preskaŭ ĉiutage, de la 21-a ĝis la 23:30-a, pli malpli. La televido montris la bildojn blanke-nigre, kaj nur ekzistis unu kanalo, kiu ĉiutage elsendis nur dum kelkaj horoj. Tamen, laŭ niaj tiamaj postuloj, tio sufiĉis por ravi nin. Cetere, ni vivis sub la faŝisma registaro, kaj tial ikara⁶ revado povus furiozigi iun dion el la portugalia olimpo. Do, ni kontentiĝis per malmulto.

Posttiam, ni ekvidis la eŭropan televidan festivalon ĉiujare, kiun neniu portugalia kantisto venkis ĝis hodiaŭ, sed ni neniam perdis la esperon iam venki: se mi ne vidos tion, certe miaj nepoj vidos. Ni ekspektis futbalajn ludojn, filmojn kaj teatron, en televido. La filmoj estis ĉiam bonaj, kaj ankaŭ la teatroj. Kiam oni ne povas elekti, oni kontentiĝas kun iu ajn novaĵo: vivo de malriĉaj homoj, mone malriĉaj kaj malriĉaj en siaj deziroj.

Kelkaj el la spektantoj, ĉefe sinjorinoj, jam havis sian preferatan sidlokon, sur kiu neniu alia sidiĝis, respektoplene al la plaĉoj de la najbaroj. Mi memoras, je la distanco de pli ol kvar jardekoj, mian infanan gapon, kiam iam mi malkovris, sur la perfekte blanke farbita muro de la salono, ke ia homa formo, grizeca kvazaŭ ombra, sin difinis flanke de unu el la seĝoj pli proksimaj de la muro. Sur tiu seĝo ĉiam sidiĝis la sama sinjorino, kiu sin klinis al la muro kaj apogis la korpon sur ĝin. Tiam, post mia demandado, mia patrino kaj mia

onklino devis klarigi al mi, ke kelkaj homoj ne havas ĉiutagajn higienajn kutimojn, kaj do tial la ombro ne estis ombro... Mia gapo kreskis eĉ pli...

Pli malfrue, la nomita Kolonia Milito, okazinta de 1962 ĝis 1974, fariĝis pli reala. Ni ankoraŭ ne spektis la militon en reala tempo kiel nun, sed ĉirkaŭ la Kristnasko, ĉiujare okazis deprima spektaklo dissendita de nia televida kanalo: senfinaj vicoj da portugaliaj soldatoj, en Afriko, atendis sian momenton por diri 5 aŭ 6 sekundan frazon al siaj familianoj. Kelkaj sentis gorĝan nodon kaj ne kapablis profiti la momenton, tiun jaran momenteton 5-sekundan, por sendi kisojn al la patrino, al la patro, al la fianĉino, al la familio, amikoj kaj najbaroj, kiuj, tag-post-tage spektis tiun programon, ĉirkaŭ la Kristnasko, kun lacaj okuloj atente serĉantaj siajn amatojn. Jen aperis filo, kuzo aŭ najbaro! Tiam ne konsoleblaj larmoj sulkis la vizaĝojn de la familianoj, kiuj neniam komprenis, kial siaj filoj devus iri al Afriko por mortigi homojn. Tiam, portugalia familio malofte ne havis idon mortinta en Angolo, Mozambiko aŭ Gvinebisaŭo. Multaj revenis sen brakoj, sen kruroj, blindaj. Multegaj, dum jaroj post la milito, sin kaŝis animale sub tablo, se neatendita bruoj, kiel falinta kulero, sonus en sia salono.

La salajroj ne altiĝis, sed la prezoj de la televido malaltiĝis, kaj do, iom post iom, ĉiuj familioj ekhavis televidojn en siaj hejmoj. Ankaŭ la mia. Televido pagitaj en partopagoj, en unu, du aŭ eĉ tri jaroj. En Portugalio, la monatoj ĉiam pli grandas ol la salajroj. Mi neniam komprenis kial. Eble ni havas ian difekton en la kalendaro...

La televido restis funkcia en Sporta Klubo de Karmo, eĉ postkiam la familioj jam havis la siajn. Tamen, en SKK, la filmoj pri indianoj kaj vakeroj donis alian plaĉon al la knabaraĉo, kiuj nepre tie kuniĝis en la sabataj posttagmezoj, por spekti la epizodojn de Bonanzo, i.a. Post la filmo, la knabaraĉo forkuris, ludante per pistoloj kaj sagoj, demone kriante kiel en la ĵus spektita filmo, sin dividante en du grupoj: tiu de la vakeroj kaj tiu de la indianoj. Mi estis ĉiam indiano, evidente... ĉar mi ŝatas plumojn...



Bildo: tre malnova televido.

4 Aludo al la fakto, ke la usona flago lasita sur la Luno estis kudrita de portugaliino, laŭ noticoj de la epoko.

5 Esperantigita nomo de la fama portugalia futbalisto Eusébio da Silva Ferreira, naskiĝinta en Mozambiko, kaj ludinta ĉefe en la klubo Benfiko (por.: Benfica).

6 Ikaro: filo de Dedalo, kiu laŭmite arkitektis la labirinton de Minotaŭro. Por fuĝi de tie, la patro konstruis, por ambaŭ, flugilojn glueblajn per vakso al la korpoj, sed avertis Ikaron, ke li ne proksimiĝu de la dio Febo, la Suno, kiu al li povus puni pro la hibro (defiofendo al dio) voli proksimiĝi de dio. La junulo Ikaro, kiam sin sentis fluganta, preteratentis la konsilojn de la patro, kaj proksimiĝis de Febo, kiu fandis la vakson faligante Ikaron teren, kie li mortis.



Foto: Leo De Cooman

Miaj unuaj spertoj pri televido

de Leo De Cooman

Ne longe post la milito, kiam plej multaj minoj jam estis forigitaj el la domoj kaj hoteloj sur la digo de la flandra marbordo, mi iris al Blankenberge kun onjo, kiu anstataŭis mian multe tro frue mortintan panjon. Mi tiam aĝis iom pli ol dek jarojn.

Promenante sur la digo ni vidis strangan konstruaĵon alte super la tegmento de unu el la hoteloj. Ĝi ne similis iun pafilon. Antaŭ la pordo staris tabulo kun anonco: "Venu spekti televidon ĉi tie", kun detaloj pri horaro kaj kotizo, kiun mi ne plu memoras, krom ke ne temis pri bagatela sumeto.

Jam tiam tekniko interesis min - onidire ĝi estas en miaj genoj. Mi do insistis kaj onjo konsentis iri tien je la vespero.

Iu sinjoro longe prelegis pri la teknikaĵoj de la "moderna" televida sistemo. Li klarigis pri bildlinioj, frekvencoj, antenoj, ktp. Mi provis kompreni liajn klarigojn, tamen tiam ankoraŭ multo restis malklara por mi.

Apud li, sur la podio, staris grandega aparato kun ne tre granda, iom ronda ekrano. Dum lia prelego la ekrano restis nigra. Post la prelego, la preleginto ŝaltis la misteran aparaton. Post kelka tempo aperis neĝo sur la ekraneto. Ni devis paciencie atendi la komencon de la elsendo de la angla televidostacio. Mi komprenis, ke la sendilo troviĝis trans la maro, teorie tro malproksime por havi normalan ricevon. Sed pro la tre alta pozicio de la anteno, la ricevo tamen iom sukcesis.

Jen subite malantaŭ la neĝo aperis bildo: BBC... Mi tiam ankoraŭ ne lernis la anglan, tamen BBC estis konata de ni, ĉar dum la milito, iu stacio de BBC disaŭdigis novaĵojn en la nederlanda. La okupaciantoj strikte malpermesis nin aŭskulti tiajn staciojn, kiujn ili cetere disturbis. Ni tamen aŭskultis kaj provis kompreni ion spite la disturbojn. Mi bone memoras, ke mi ne rajtis pri tio ion diri, eĉ ne al la plej bonaj amiketoj en la lernejo.



Bildo: desegno de televido

Post nova atendado aperis iu persono parolanta en la angla. Mi komprenis nenion, kaj verŝajne neniu el la spektantaro komprenis ion, ĉar nek la bildoj, nek la sono estis tre klaraj. Sed la aparato funkciis, la bildoj estis videblaj kaj moviĝis.

Mi longe pripensis ĉion, kion la preleginto diris, kaj verŝajne tio stimulis mian sciemon pri sciencaj kaj teknikaj aferoj.

En ŝranko, en nia subtegmento, mi trovis malnovan broŝuron kun malhelruĝa koverto pri "memkonstruo de televida aparato" el la dudekaj jaroj... en la nederlanda! En la subtegmento troveblis nur malmultaj dokumentoj en mia gepatra lingvo. La generacio antaŭ ni devis paroli la francan en la lernejo. Eĉ la kursoj pri la nederlanda estis en la franca! Kompreneble mi legis kaj relegis la tekstojn, detale esploris la desegnaĵetojn kaj la elektronikajn skemojn kaj petis klarigojn de miaj pli aĝaj fratoj. Temis pri aparato funkcia laŭ la sistemo de Nipkov. En ĝi estis motoro, kiu turnis diskon, en kiu estis tridek truetoj laŭ spiralo. Laŭ la broŝuro oni transsendis la bildojn per "mezaj ondolongoj". Tia aparato devis esti konektata al "ordinara" radioricevilo. Poste mi ekkomprenis, ke tio eblis nur, ĉar temis pri tre malgranda bildo, konsistanta el nur tridek linioj. Mi neniam reale vidis tian aparaton, nur post pluraj jardekoj mi trovis fotojn pri ili en interreto.

Mi tamen memoras, ke mi faris devigan lernejan prelegeton pri televido en la kvara klaso de la mezlernejo. Tiu klaso en nia tempo nomiĝis la tria, ĉar ni kalkulis inverse: la lasta klaso estis la unua! Mia prelegeto

estis nekutima afero. Fakte estis devige legi libron kaj prelegi pri ĝi. Feliĉe ne estis problemo trovi teknikan libron pri televido en la urba biblioteko. Mi ankaŭ memoras, ke la instruisto komprenis nenion, kvankam miaopinie mi bone klarigis la funkciadon de televido. Li estis historiisto kaj pri sia fako sendube sciis ĉion, sed pri teknikaj aferoj li komprenis nenion.

En 1953, kiam televidaj elsendoj komenciĝis en Belgio, alia fratino de mia panjo instaligis altan televidan antenon sur sian tegmenton. En ŝia ĉambro tronis la novaĵo. Ĉar ŝi loĝis tute apude, mia avo, kiu tiam aĝis 86 jarojn, kaj mia onjo kaj mi ĉiun ĵaŭdon vespere iris kune spekti la televidan teatraĵon "Ŝipestro apud Matilda". Mia karmemora avo eĉ konsultis la televidan programon en sia gazeto, ĉar li ne volis maltrafi tiun elsendon. Unu el la rolantoj memorigis lin pri lia "onklo Izidoro", pri kiu mi cetere neniam trovis spuron en la genealogiaj listoj, kiujn frato poste redaktis.

Tiu programo estis simpla teatraĵo, kompreneble nigra-blanka, kun malmultaj rolantoj, tamen tre ŝatata en la tuta regiono.

La elsendoj komenciĝis nur vespere kaj eblis spekti nur la du Bruselajn staciojn (unu en la nederlanda kaj unu en la franca) kaj unu stacion en la nordo de Francio. Ĉar la "normoj" de la franca kaj "nia" nederlandlingva elsendoj malkongruis, por povi spekti ambaŭ necesis tre komplika kaj multtekosta "belga" televidilo kun la diversaj "normoj". Jes! Jam tiam la venko de la lingva barilo estis malfacila kaj multtekosta afero, kiu cetere ne kontentige funkciis pro la komplikiteco de la "multnorma" aparato, kaj ofte paneis, kaj do iamaniere estis antaŭbildo de... la nuna EUa "multlingva aparato".

Noto de LK

Nefakuloj trovos kelkajn teknikajn klarigojn, de la sama aŭtoro, pri la funkciado de televido ĉe:

<http://www.esperantopt.com/dosieroj.html>




Foto: Nikolaj Neĉaev

de Nikolaj Neĉaev

El kaoso en harmonion (taglibro)

Mi fuĝis el kaoso,
El urbo terura,
El bruo polua,
El civilizo freneza
En ĝardenan harmonion
De koloroj kaj aromoj.
La ĝardeno ĝuas freŝon
Post varmego de la tago.
Okcidento rozkoloras
Kaj stelaroj ree lumos
Super dormo mia paca.

Venis tempo al mateno,
Ree helas alto blua.
Eksalutas venon sunan
Mia kor' kaj trilo frua.
Mi satdormis sub stelaroj.
En mateno mi tre viglas
Kaj pro tio mia ĝojo
Kanti, trili min devigas.

Tage venis nova temo,
Koren venis pluva puro.
Koincidas kora tremo
Kun muziko de naturo.
Pluvo ĉesis. Alt' ĉiela
Ree freŝe, pure bluas.
Mia celo iĝas hela,
Mi liriken evoluas.





Foto: Valentin Melnikov

Ĉastuŝkioj

**el la rusa tradukis
Valentin Melnikov**



Ĉi tio estas iom libera traduko de selektitaj rusaj popolaj kantetoj, nomataj "ĉastuŝki". Oni kantas ilin laŭ tradicia melodio dum diversaj festoj. Ekzistas miloj da strofoj kun humura kaj ofte iom maldeca enhavo.

Hufojn havas la ĉevalo,
Ĉar la viv' estas batalo;
Supre – selo kun rimen':
Vivo estas abomen'.

Laŭ darvina teorio,
Ni devenas de simio.
Bopatrino, laŭ simil',
Eble naskis krokodil'.

Belulino en boato
Navigadas kun amato;
Albordiĝi mankas fort':
Staras edzo sur la bord'.

Mi ĉapelon novan prenis,
Kaj laŭ strat' kun ĝi promenis.
Ĝin aprezis post moment'
La kolombo de tegment'.

Manjon, laŭ komuna klaĉo,
Edzinigis stultulaĉo.
Kia stranga opini'!
Ŝia edzo estas mi!



Foto: Imre Szabó

de Imre Szabó

Mi atendis vin

Mi atendis vin la tutan tagon,
denove tutan tagon,
mi frotadas la tagojn,
kiel rozarion
monaĥino klostroprofunde
inter la dikaj, mukozaj muroj,
en ĉi enorma premilo
lante fluetas la elpremitaj
vortoj de la preĝo,
la masonaĵo de la muroj
estas preĝo de la antaŭaj
jam delonge foririntaj
al la lule lilia tiliejo
kun sia rozario
ili kuŝas tie sube
kun rozariaj manoj
virgaj senkulpaj senpensaj
kaj ili estas feliĉaj
pli grasas la herboj
super ilia kuŝejo,
la ĉielo estas pli fore
ol iam ajn,
du metrojn sube
ili resurektos,

nepre ili resurektos,
ĉar oni ellevos ilin,
la psalmoj ellevos ilin,
la psalmoj kiel larĝaj flagoj
ŝvebe rampos al la
gardostaraj arboj
al la arbaroj por vindi ilin
kaj engluti
kiel la apenaŭ moviĝanta
eterneco vermoplena
kaj iliaj ostoj iros
al la altaroj por sanktigi ilin
ĉiu gramo da ostoj valoros pli
ol tri gramoj da oro
Kaj nun mi staras en tiu ĉi premilo
kolosa liganta la karnon al la ĉielo
kie vakuas la sentoj
malplenokulaj anĝeloj flugadas
de nenio al imago
kaj reen...
Donu al mi pacon Sinjoro
permesu ke defalu tiuj sopiroj
kiel kardoj el la hundofelo
mi povu stari antaŭ vi
suverene sensufere
ho Sinjoro, lasu
ke mi elvomu la spasmajn tagojn
la spasmajn kaj la tagojn
ilin ambaŭ aparte
kaj malpleniĝinte mi sentu la ĝuon
de malsato malsato
kiun sopiras stomakmalsanuloj.
Lasu ke mi elvomu min
Ho, Sinjoro, senreste
mi frotadas la suferojn
grandgloban rozarion.



Foto: Paulo Sérgio Viana

**el la portugala tradukis
Paulo Sérgio Viana****Kiel oni inventis almanakojn****de Machado de Assis**

For, bibliografo! Mi havas nenion kun vi. Nek kun vi, scivolemulo pri polvokovritaj historioj. For, vi ĉiuj; tio, kion mi rakontos, interesas aliajn homojn, malpli specialajn kaj ege malpli tedajn. Mi raportos tion, kiel oni inventis almanakojn.

Vi scias, ke Sinjoro Tempo, ekde sia naskiĝo, estas blankbarba maljunulo. Poetoj ne alie nomas lin: la maljuna Tempo. Neniu bildigis lin alimaniere. Kaj ĉar ekzistas homoj, kiuj petolas kun maljunuloj, unuj frapetas al li la ventron (tiaj estas la ŝercemuloj), aliaj eĉ defias lin; ankoraŭ aliaj batalas kontraŭ li, sed la diablulo ĉiujn venkas; tia estas la regulo.

Tamen, unu afero estas barbo, alia estas koro. Barboj povas esti maljunaj, dum junaj estas la koroj; kaj inverse: ekzistas maljunaj koroj kun freŝaj barboj. Ne tia estas la regulo, sed tio okazas. Tio okazis al Sinjoro Tempo. Unu tagon, Tempo vidis dekkvinjaran knabinon, belan kiel suna tago, rideman kiel mateno, trankvilan kiel nokto, ia kunaĵo de raraj kaj delikataj kvalitoj, kaj li eksentis, ke io batas al li ĉe la maldekstra brustoflanko. Li rigardis ŝin kaj la batotoj pligrandigis. La okuloj de la knabino, veraj fajraĵoj, ardigis la liajn, nur pro rigardado.

- Kio estas tio? - murmuris la maljunulo.

Kaj la lipoj de Sinjoro Tempo ektremis, kaj la sango pli rapide fluis, kvazaŭ vipata ĉevalo, kaj li tuta aliĝis. Li sentis, ke tio estas amo; sed li rigardis la oceanon, nome vastan spegulon, kaj trovis, ke li estas maljuna. Ĉu tia maljuna viro amus tian knabinon? Li forlasis la maron, li forlasis la belulinon, kaj ekdediĉis sin al cerbumado pri la batalo de Salamiso.

Antikvaj bataloj estis por li, kiel por ni malnovaj ŝuoj. Kion gravis por li Salamiso? Li ripetis ĝin per la memoro, kaj je lia malfeliĉo, li vidis la saman fraŭlinon inter la batalantoj, flanke de Temistoklo. Post kelkaj tagoj, li suprengrimpis montopinton, nome Ĉimborazon¹; li malsupreniris en la dezerton Sinaj; li ekloĝis en la Suno, li

¹ Ĉimborazo: malaktiva, 6000-metre alta vulkano en Andoj (Ekvadoro).

ekloĝis en la Luno; ĉie aperadis al li la bildo de la bela dekkvinjara knabino. Fine li aŭdacis iri renkonte al ŝi.

- Kiu estas via nomo, belega estulo?

- Mia nomo estas Espero.

- Ĉu vi konsentas ami min?

- Vi estas troŝargita de jaroj, ŝi respondis; mi staras ĉe ilia burĝoniĝo. Geedziĝo ne eblas. Kiu estas via nomo?

- Ne gravas al vi mia nomo; sufiĉas scii, ke mi povas donaci al vi ĉiujn perlojn de Golkondo²...

- Adiaŭ !

- Diamantojn el Ofir³...

- Adiaŭ!

- Rozojn el Ŝarono...

- Adiaŭ! Adiaŭ!

- Vinberejojn en Engaddi⁴...

- Adiaŭ! adiaŭ! adiaŭ! Ĉio tio iam estos mia; baldaŭ aŭ post longe, iam...

Fraŭlino Espero forkuris. Sinjoro Tempo silente rigardis, ĝis li entute forperdis ŝin. Li ekmalfermis la buŝon por malbeni ŝin, sed la paroloj, kiujn li eligis estis ĉiuj benaj; li emis kraĉi sur la lokon, kie la fraŭlino piediris, sed ne povis eviti la impulson kisi ĝin.

Tiam envenis al li en la kapon la ideo pri almanako. Oni ne kutimis uzadi almanakojn, ĝis tiam. Oni vivis sen ili; oni negocadis, oni malsaniĝadis, oni mortadis, sen konsultado al tiaj libroj. Oni konis la iradon de Suno kaj de Luno; oni kalkuladis monatojn kaj jarojn; ĝi estis, finfine, la sama afero; sed tio ne estis skribata, oni ne numeradis jarojn kaj semajnojn, oni ne nomadis tagojn, nek monatojn, tute ne; ĉio fluadis, kiel birdaro, kiu ne lasas spurojn en la aero.

- Se mi trovos manieron venigi antaŭ ŝiajn okulojn tagojn kaj monatojn, kaj se mi tion reproduktos ĉiujare, por ke ŝi konkrete vidu, ke forpasadas al ŝi la junaĝo...

Jen rezonado de maljunulo, sed oni ĉion pardonas je amo, eĉ se ĝi ekburĝonas el ruinaĵoj. Sinjoro Tempo inventis almanakon; li komponis libron simplan, sekan, senmarĝenan, sen io ajn; nur la tagoj, la semajnoj, la monatoj kaj la jaroj. Unu tagon, je mateniĝo, la tuta tero vidis, ke falas el la ĉielo pluvo el bultenoj; oni komence pensis, ke tio estis ia novspeca prujno, poste oni vidis, ke ne, kaj time oni forkuris; fine, unu pli kuraĝa

² Golkondo: antikva, glora urbo em Hindio.

³ Ofir: legendeca regiono el kie Salomono venigis oron.

⁴ Engaddi: oazo okcidente de la Morta Maro, fama pro sia naturriĉeco, plurfoje menciata en la Biblio.

homo prenis unu bultenon, aliaj faris la samon, legis kaj komprenis. La almanako alportis la lingvaĵon de urbo kaj de kampoj, kie ĝi falis. Tiel la tuta tero ekposedis, samtempe, la unuajn almanakojn. Se multaj popoloj ne posedas ilin ankoraŭ hodiaŭ, se aliaj mortis ne leginte ilin, la kaŭzo estas, ke ili ekaperis post la okazaĵoj, kiujn mi nun priskribas. Tiukaze, la diluvo estis universala.

- Bone, diris Espero, preninte bultenon, kiun ŝi trovis en la legomĝardeno; nun mi ne plu mistrafos la tagojn renkonti amikinojn. Mi vespermanĝos aŭ tranoktos ĉe ili, por tio mi strekos ĉi tie sur la folioj, per koloraj signoj la elektitajn tagojn.

Ĉiuj havis almanakojn. Ne nur junulinoj, sed ankaŭ maturulinoj, kaj maljunuloj, kaj junuloj, juĝistoj, sacerdotoj, komercistoj, ŝtatestroj, servistoj; estis mode porti en la poŝo almanakon. Poeto verkis poemon, per kiu li atribuis la aferon al sezonoj, pro ordono de iliaj gepatroj, Suno kaj Luno; astronomo, male, pruvis, ke almanakoj estis restaĵoj de iu astro, sur kiu, de la origino de la jarcentoj, estis skribitaj la lingvoj, kiujn oni parolas sur la tero kaj probable sur aliaj planedoj. Alia estis la ekspliko de teologoj. Granda fizikisto konceptis, ke almanakoj estas kreaĵo de la tero mem, kies vortoj akumuligis en la aero, viciĝis, presiĝis en la aero mem, kiu transformiĝis en paperfoliojn, danke al... Tio do daŭris; tiom kaj tiaj estis la teorioj, ke tiu de Fraŭlino Espero estis plej akceptata de la popolo.

- Mi pensas, ke almanako estas nur almanako - ŝi ride diris.

Kiam alvenis jarfino, ĉiuj homoj, kiuj tre zorge konservis almanakon, por konsulti ĝin dum la sekva jaro, ekmiris, ke dumnokte falis alia pluvo el almanakoj. La tuta tero matene troviĝis plenplena je ili; tiuj estis la novjaraj. Ili kompreneble flankenlasis la malnovajn. Post la fino de la jaro, alia almanako; tiel sinsekve ili alvenadis, ĝis Fraŭlino Espero kalkulis dudek kvin jarojn, aŭ, kiel oni tiam diris, dudek kvin almanakojn.

Neniam la tagoj ŝajne fluis tiel rapide. Flugis la semajnoj, kun ili la monatoj, kaj tuj post la komenco de la jaro, jen ĝi finiĝis. Tia efiko malĝojigis la teron. Eĉ Fraŭlino Espero, vidante, ke la tagoj tiel rapide iradis, kaj ne trovinte edzon, aspektis senentuziasma; sed tio daŭris nur momenton. Tiun saman momenton aperis antaŭ ŝi Sinjoro Tempo.

- Jen mi, ne lasu, ke maljuneco atingu vin... Amu min...

Fraŭlino Espero respondis al li per du grimacoj kaj restis fraŭla. Certe venos fianĉo, ŝi pensis.

Rigardante sin antaŭ la spegulo, ŝi konstatis, ke fakte malmulto ŝanĝiĝis. Dudek kvin almanakoj

preskaŭ ne forviŝis la freŝecon de dek kvin jaroj. Ŝi estis la sama, belega, juna Espero. La maljuna Tempo, pli kaj pli brulanta en pasio, faligadis almanakojn, jaro post jaro, ĝis ŝi atingis la tridekan, kaj poste tridek kvin.

Estis jam dudek almanakoj; ĉiuj homoj ekmalamis ilin, escepte de Fraŭlino Espero, kiu estis plu tiu sama knabino dekkvinjara. Tridek almanakoj, kvardek, kvindek, sesdek, cent almanakoj; rapidaj maljuniĝoj, mortoj post mortoj, rememoraĵoj maldolĉaj kaj krudaj. Eĉ Fraŭlino Espero, starante antaŭ spegulo, trovis blankan haron kaj haŭto-faldon.

- Unu haŭtofaldo! Unu sola!

Alvenis aliaj, kune kun la almanakoj. Fine la kapo de Espero fariĝis ia neĝomonto, la vizaĝo fariĝis ia mapo el linioj. Nur la koro plu estis verda, same kiel tiu de Sinjoro Tempo; ambaŭ verdaj, eterne verdaj. La almanakoj plu faladis. Unu tagon, Sinjoro Tempo malsuprenvenis por vidi la belan Esperon; li trovis ŝin maljuna, sed fortika, kun ĉiama rido ĉe la lipoj.

- Eĉ tiel mi amas vin, kaj mi vin petas... - li diris.

Fraŭlino Espero nee skuis la kapon; sed tuj poste, ŝi prezentis al li la manon.

- Jen do - ŝi diris - ĉar ambaŭ maljunas, ne longa estos la geedzeco.

- Ĝi povas esti senfina.

- Kiel do?

La maljuna Tempo prenis la fianĉinon kaj venis kun ŝi al blua, senlima spaco, kie la animo de unu kisis la animon de la alia per kiso eterna. La tuta kreitaro ĝue ektremis. Verdeco en la koroj fariĝis ankoraŭ pli verda.

Post tiu tempo, Espero kunlaboris en la almanakoj. Ĉiujare, al ĉiu almanako Espero alligis verdan rubandon. Tiam la malĝojon en almanakoj ŝi gajigis; kaj neniam Sinjoro Tempo pasigis semajnon, sen tio, ke la edzino ne metis misteron en la sekvan semajnon. Tiel ili ĉiuj pasadis, plenaj aŭ malplenaj, sed ĉiam montrante ion, kio plenigis la animon de homoj per pacienco kaj per vivo.

Tiaj la semajnoj, tiaj la monatoj, tiaj la jaroj. Kaj pluve faladis almanakoj, multaj el ili kun aldono kaj ornamo per bildoj, versoj, rakontoj, anekdotoj, mil distraj aferoj. Kaj ili pluve faladis. Kaj ili faladas. Kaj falados almanakoj. Sinjoro Tempo presigas ilin, Sinjorino Espero ilin bindas; tia estas la tuta oficejo de la vivo.

Noto de LK

Pri Machado de Assis, legu ankaŭ ĉe

La Karavelo, n-ro 2, n-ro 3 kaj n-ro 6



Foto: Luiza Carol

de Luiza Carol

Fraŭlino Lunalum'

[Dekoracio: floroj kaj balonoj.]

RAPORTISTO

Saluton, karaj televidspektantoj! Tio estas la unua tridimensia televidkanalo de Odnalujo. Hodiaŭ, la 22-an de septembro 3008, ni elsendas rekte el la malsanulejo "BONHUMORO" en la urbo Obru. Ni troviĝas en la plej gaja ĉambro de la malsanulejo: la Adiaŭa Ĉambro. Ni festas la baldaŭan vojaĝon al la transmondo, farota de nia fama, bela, plej amata odnaluja aktorino, FRAŬLINO LUNALUM'!

[Aplaŭdoj. Fraŭlino LUNALUM' eniras la scenejon. Ŝi ŝajnas tre juna, estas brile kaj gaje vestita, ridetanta, tenanta etan hundon en la brakoj. Ankaŭ la hundo havas rubandojn kaj ŝajnas gaja.]

Kara sinjorino, laŭ la malnova tradicio de Odnalujo, ni, viaj admirantoj, deziras al vi tutkore: ĜOJAN MORTOTAGON!

[Aplaŭdoj. La spektantoj kantas kune: "Ĝojan morton al vi! Ĝojan morton al vi! Ĝojan morton, kara LUNALUM'! Ĝojan morton al vi!"]

Nun, laŭ la malnova tradicio de Odnalujo, ni aŭskultu la adiaŭajn ŝercojn pretigitajn de nia kara vojaĝonto. Estimataj televidspektantoj, jen la lastaj ŝercoj de la plej granda stelo de la odnaluja scenejo: Fraŭlino LUNALUM'!

[Aplaŭdoj.]

FRAŬLINO LUNALUM'

Saluton, geamikoj! Hodiaŭ, mi ĝojas donaci al vi miajn lastajn tri ŝercojn, kiujn mi pretigis por vi dum sepdek unu jaroj. Jen mia unua ŝerco: mi ne estas 97-jara, kiel la amaskomunikiloj diris. Mi estas 121-jara! [Aplaŭdoj] Jen mia dua ŝerco: mi ne estas



Bildo: Feino

mi. Tiu estis ĝis nun mia plej grava sekreto. Ekde la aĝo de 50, kiam mi debutis en kinofilmo, mi publike portas maskon nomitan "FRAŬLINO LUNALUM'", farita de la firmao "Paralelvivo". Nur mia familio konas min ankaŭ senmaska, ĉar nur kiam mi estas en mia vera hejmo, mi demetas la maskon. Kompreneble, mia vera hejmo estas sekreta...

RAPORTISTO

Mi... ne komprenas... kiel... kial...

FRAŬLINO LUNALUM'

Tio estas simpla afero: fraŭlino LUNALUM' estis nur rolo, kiun mi ludis dum 71 jaroj. Mia plej interesa rolo ĝi estis!

RAPORTISTO

Kaj... kaj... kio pri viaj 28 geedziĝoj? Kaj pri ĉiuj viaj eksedziĝoj? Kaj pri ĉiuj grandaj skandaloj ĉirkaŭ vi?

FRAŬLINO LUNALUM'

Ho, ĉio rilate mian privatan vivon estis fikcio.

RAPORTISTO

Ĉio? Ĉu vere ĉio?

FRAŬLINO LUNALUM'

Ĉio. Mi ne volis permesi al la raportistoj eniri mian familian vivon. Mia vera privata vivo estis tre banala: mi edziniĝis nur unufoje,

kiam mi estis 20-jara. Mi vivis feliĉe kun mia sola edzo dum 99 jaroj, kaj antaŭ 2 jaroj mi iĝis vidvino.

RAPORTISTO

Sed... kio pri viaj fikciaj edzoj? Ĉu ankaŭ ili portis maskojn?

FRAŬLINO LUNALUM'

Ho, ili estas aktoroj, kiujn oni dungis por ludi kun mi en tiu ĉi interaktiva spektaklo.

RAPORTISTO

Do, ĉu ĉion, kion ni konas pri via vivo, vi konsideras "interaktiva spektaklo"?!

FRAŬLINO LUNALUM'

Jes, ja. Nur mia sekreta familia vivo estis vera.

RAPORTISTO

Sed... tamen... mi opinias, ke la plej grandan emociion de via vivo vi spertis, kiam vi ricevis la grandan premion "LA ORA BOVIDO"...

FRAŬLINO LUNALUM'

Ho, ankaŭ tiam mi ludis mian rolon... mi ŝajnis troigatan emociion, fremdan al mia animo.

RAPORTISTO

Ĉu vi neniam spertis verajn emociojn dum via vivo?

FRAŬLINO LUNALUM'

Mi ja spertis verajn emociojn. Ekzemple: la plej gravaj ĝojoj de mia vivo estis la momentoj kiam mi iĝis edzino, patrino, bopatrino, avino, praavino kaj pra-praavino. Pri la malĝojoj, ne indas paroli dum festa momento.

RAPORTISTO

Tamen... ĉu vi vere kreis 71-jaran ŝercon, nur por eviti la malĝentilecon de la televid-raportistoj?! Ĉu nur pro tio?!

FRAŬLINO LUNALUM'

Nu... fakte, mi havis ankaŭ aliajn kialojn. Mia edzo estis la posedanto de la firmao "Paralelvivo". Li sponsoris tiun interaktivan spektaklon... por la reklamo. Nun la firmao apartenas al nia filo kaj nia bofilo. Mi esperas, ke ili ja gajnos per tiu ĉi reklamo. Krome... mi amegis ludi por tiu ĉi ŝerco. Ĝi estis la plej grava rolo de mia vivo.

RAPORTISTO

Kial vi tiom ĝuis tiun rolon?

FRAŬLINO LUNALUM'

Ĉar mi volis pruvi, kiom facile estas iluzii la amaskomunikilojn kaj kiom facile la amaskomunikiloj povas krei fikciajn personecojn. Atentu! Hodiaŭ vi malkovras, ke Fraŭlino LUNALUM' estis fikcio; morgaŭ vi eble malkovros, ke la prezidento estas fikcio, aŭ ke la armeestro estas tia, aŭ la financministro... Sed precipe mi ludis ĉi tiun rolon, ĉar ĝi estis amuzega rolo... Jes... amuzega... Mi estas tre kontenta, ke dum mia tuta vojaĝo tra ĉi vivo, mi tre bele amuzis min kaj amuzis la aliajn... Mi esperas, ke mi forlasas malantaŭ mi gajajn memorojn... Nu, kion vi pensas, Jojo? Ho, mi preskaŭ forgesis pri mia tria ŝerco! Jen ĝi: Vi ĉiuj konas mian hundon Jojo, ĉu ne?

RAPORTISTO

Ho jes, via Jojo estas la plej fama hundo de Odnalujo! Liaj fotoj aperis en dekoj da revuoj kaj sur skatoloj de hundmanĝaĵoj! Jojo estas preskaŭ same fama kiel vi!

FRAŬLINO LUNALUM'

Bonege! Nun aŭskultu. Mia Jojo ne estas hundo. Li estas kato. Li portas maskon, faritan de la firmao "Paralelvivo".

[Ŝi demetas la maskon de la hundo kaj vidigas la katon.]

KATO

Miaŭ!



Bildo: Ĉu la hundo estiĝas kato?



Bildo: Roger Gotardi

**el la portugala tradukis
Roger de Castro Gotardi**

La nztuketo

de Arturo Azevedo

Juvencio, eksplikisto pri matematikoj, estis funebra viro. Neniam iu vidis lin ridi, neniam iu ekvidis lian rigardesprimon tra liaj sunokulvitroj. Li havis vangojn okulglutajn, nazon kurban, barbon longan. Li ĉiam surhavis nigrajn vestojn kaj uzis altan ĉapelon.

Li estis distriĝema, kaj ŝajne estis ĉiam vaganta tra la intermondoj de l' senfino, portata sur nubo el numeroj.

En unu el tiuj belaj posttagmezoj de Rio-de-Ĵaneiro, kiam ĉiuj belaj inoj fiere iras, tra la Avenuo, montrantaj sian belecon kaj siajn tualetojn¹, la eksplikisto Juvencio prenis, kun ioma malfacileco, la tramon en Placo de Karioko², por iri ekspliki en Kateto³. Estis la horo de la plej vigla trafiko. La sidlokoj estis konkerataj pere de rapideco kaj lerteco.

La eksplikisto Juvencio hazarde trafis tramon virinplenan, tramon, kiu plej similis al la barko de Kitero⁴, kvazaŭ pentrita de iu moderna Watteau⁵. Kiel domaĝe! La eksplikisto Juvencio, kiu estis vidvo pozitivista, ne havis rigardojn por la plej bela porcio de la homaro.

¹ La aŭtoro uzis la francan vorton *toilets* en la originalo. Nuntempe la franca fremda vorto akiris brazilportugalan formon – *toaleta*.

² *Largo da Carioca*, estas publika ejo, situanta en la centro de la urbo Rio-de-Ĵaneiro. Ĝi estas ampleksa loko, intense traŭrata de laborantoj; scenejo de popolaj artistoj kaj stratvendistoj kun la plej diversaj servoj kaj varoj. De multaj konsiderata la koro de la centro de Rio-de-Ĵaneiro.

El http://pt.wikipedia.org/wiki/Largo_da_Carioca.

³ *Catete* estas kvartalo de la suda regiono de Rio-de-Ĵaneiro, kie troviĝas Palaco de Kateto (iama sidejo de la prezidanteco de la Respubliko), kiu nuntempe estas muzeo.

⁴ Greka insulo. Aliru al

<http://eo.wikipedia.org/wiki/Kitero>.

⁵ *Jean-Antoine Watteau*, franca pentristo.

Sur la benko, sur kiu li sidiĝis, estis tri trolukse ornamitaj koketulinioj⁶, kiuj ebrigis lin per iom da kapturnaj parfumo. La fronta benko estis okupata de familio: tri elegantaj fraŭlinoj, akompanataj de la patrino, kiu povus esti kredata ilia plejaĝa fratino.



Bildo: Tramo en Brazilo

La tri fraŭlinoj troparolis, komentante ĉion, kion ili jam vidis dum la promenado. Unu el ili, cetere la plej bela, svingis inter la fingroj etan blankan nztukon, delikategan nztukon, ĉe kiu neniu nazo aŭdacus mungi⁷ sin. Je la ardo de la babilado, la fraŭlino faris geston, kaj jen la nztuko, forglitante el ŝia mano, falis – vidu, kian fatalan hazardon! – falis ja sur la pantalonfendon de la eksplikisto Juvencio. Li, kiu sin distris, legante libron pri matematikoj, tute ne rimarkis la okazaĵon.

La koketulinioj tre plaĉe ridegis, sed neniu aŭdacis iri preni la nztukon de tie, kie ĝi falis, por transdoni ĝin al la proprietulino. Intertempe, la ino, kiu sidis apud la eksplikisto Juvencio, kubutfrapis lin kaj, per signifa rigardo, vekis lian atenton pri la nztuko.

Kio okazis tiam estis eksterordinara. La eksplikisto Juvencio diris al si mem: "Kiam mi detenos min de miaj distriĝoj? Mi ja lasis ekstere pecon de la ĉemizbasko!" Kaj tuje, kovrante per la libro tion, kion li estis faranta, li ŝovis la nztuketon en la pantalonfendon.

Poste, li demetis la ĉapelon antaŭ la koketulino, dirante:

— Koran dankon, kara fraŭlino – kaj daŭre legis neĝeneble.

⁶ En la originalo, plurloke la aŭtoro uzis la francan vorton *cocotte(s)*, tradukita kiel koketulino(j). Ankaŭ tiu vorto portugaliĝis en Brazilo al *cocota(s)*.

⁷ *mungi* – purigi ies nazon el la muko (PIV).

Esperantaj nomoj elvenantaj el la portugala

de João José Santos



Resumo de unu-hora prelego sekvita de debato, okaze de la 24-a Renkontiĝo de la Portugaliaj Esperantistoj, en Alkoŝeto, la 4-an de oktobro 2008. Vidu la disponeblan materialon pri la evento en: <http://www.esperantopt.com/dosieroj.html>. Tie preneblas ankaŭ la diapozitivaro montrita en la evento.

Foto de Juliana Santos

ENKONDUKO

Enkadre de la traduka laboro por La Karavelo, kelkaj homoj starigis dubojn rilatantajn al la traduko kaj transliterado de portugaliaj etnaj vortoj en esperanton. Tiel mi decidis eklabori pri la verko *Tradukmetodo de la portugala al esperanto*. Kiam la libro jam havis kelkajn dekojn da paĝoj, evidentiĝis la neceso liberigi parton de tiu libro, kiu konsistigos alian libron. Ĝi nomiĝos *Traduko kaj transliterado de portugaliaj nomoj al esperanto*. Ambaŭ verkoj espereble aperos post ne multaj monatoj.

La nuna prelego aludas precize al kelkaj eroj de la temo de ĉi lasta libro.

DETRUENDAJ MITOJ

Kreiĝis en la historio de esperanto diversaj mitoj. Tri el ili, kiuj iel rilatas al la asimilado de nomoj, devas esti detruataj, ĉar ili malhelpas la disvolviĝon de esperanto. Temas pri la jenaj mitoj: 1-A DETRUENDA MITO: La proprajn nomojn oni ne tradukas. 2-A DETRUENDA MITO: En esperanto ekzistas oficialaj vortoj. 3-A DETRUENDA MITO: En esperanto ne ekzistas homonimoj.

1-A DETRUENDA MITO:

La proprajn nomojn oni ne tradukas.

Oni rimarku, kio okazas en la portugala lingvo rilate la asimiladon de nomoj el la aliaj lingvoj, kaj oni vidu, ke kelkfoje oni ne

tradukas la nomojn, alifoje oni tradukas ilin, kaj alifoje oni ilin transliteradas.

Oni observu, en la jena listo, ke kelkfoje la portugaloj transliteradas la fremdajn nomojn, prononcante ilin pli malpli portugalece.

el la angla	William Shakespeare	William Shakespeare
el la kastilia	Miguel de Cervantes	Miguel de Cervantes
el la greka	Κωνσταντίνος Καβάφης	Konstantínos Kaváfis
el la franca	Paris	Paris
el la germana	Hamburg	Hamburgo

Do, en la portugala, kelkfoje oni transliteradas la nomojn, kun minimumaj ŝanĝoj, prononcante ilin portugalece.

Pro similaj ekzemploj, ĝenerale la portugaloj, kaj ne nur, fiere asertas: *la proprajn nomojn oni ne traduku!*

Tamen, oni observu la sekvantan liston:

el la angla	White House	Casa Branca
el la ĉina	?????	Grande Muralha da China
el la germana	Wilhelm Tell	Guilherme Tell
el la franca	Charles Magne	Carlos Magno

Observante tiun liston, oni perplekse ne komprenas kial la angla nomo *William* estas transliterita en la portugala kiel *William*, sed la germana *Wilhelm* estas tradukita al *Guilherme*. Same, se la proprajn nomojn oni ne tradukas, kial do *Charles Magne* fariĝas portugale *Carlos Magno*? Ĝi devus fariĝi *Charles Magno*, simile al la transliterado de la nomo de Shakespeare. Kaj kion diri pri la asimilo al la portugala de la nomo *White House*? Ĝi devus resti la sama, se oni vere ne tradukus la nomojn. Tamen, portugaloj ĝin tradukas al *Casa Branca*, laŭ la senco de ĉiu el la vortoj, kaj eĉ la sintaksan ordon de la du vortoj oni renversigas, por ĝustigi la nomon al la portugala sintakso.

Do, for la mensogon!, ke la proprajn nomojn oni ne tradukas. Fakte, kelkfoje la portugaloj transliteradas la nomojn, alifoje

tradukas ilin, kaj ĉiam ĝustigas la prononcon al la portugala lingvo. Tamen, portugaloj, tiel kiel alilandanoj, fiere diras: *oni ne tradukas la proprajn nomojn*.

2-A DETRUENDA MITO:

En esperanto ekzistas oficialaj vortoj.

Por kompreni kiel funkcias la esperanta tradicio rilate la proprajn nomojn, oni devas scii *kio estas esperanto*, *kio estas la portugala lingvo*, aŭ pli simple, *kio estas lingvo*.

Kio estas esperanto? Ĉu ĝi estas la lingvo de Zamenhof? Ĉu ĝi estas la lingvo de l' Fundamento? Ĉu ĝi estas la lingvo de PIV? Ĉu ĝi estas la lingvo aprobita de l' Akademio de Esperanto?

La plej ĝusta kaj simpla respondo al tiu demando similas al la respondo al ĉi tiu: *Kio estas la portugala?* Kaj ĝenerale ĝi similas al la respondo al: *Kio estas lingvo?*

Se oni demandas al simpla popolano, kio estas la portugala, unu el la eblaj respondoj estas: *La portugala lingvo estas la lingvo parolata de la portugaloj, de la brazilanoj, de la angolanoj kaj de kelkaj aliaj popoloj*. Jes, la respondo estas taŭtologia, sed ĝi estus unu el la plej oftaj respondoj, se oni enketus pri tio.

Kaj pri esperanto? *Kio do estas esperanto?* Ĝi komenciĝis far Zamenhof, sed Zamenhof ne sciis nomi *komputilon*. Ĝi baziĝas sur la *Fundamento*, sed la *Fundamento* ne katenas ĝin. Ĝiaj vortoj aperas en PIV, sed aliaj aperas ĉiutage. La Akademio de Esperanto provas reguli ĝin, sed nur postkiam la esperantistaro jam kreis en ĝi.

Simile al la respondo donita supre al la demando *Kio estas la portugala lingvo?*, oni povas respondi al la demando *Kio estas esperanto?*, tiel:

Esperanto estas la lingvo de la esperantistoj, unueca sed varieca, uzata en la tuta mondo, laŭ la internaciaj ecoj de tiu kultura internacia komunumo, kaj ĝis ĉefa regulilo estas: la esperanta tradicio.

Do, en esperanto, ne ekzistas oficialaj kaj neoficialaj vortoj. En ĝi ekzistas vortoj, kiuj, tiel kiel ĉe la aliaj lingvoj, estas ŝatataj de kelkuloj kaj malŝatataj de aliaj homoj kaj

organizoj.

Do, for la mensogon!, ke en esperanto ekzistas oficialaj kaj neoficialaj vortoj, ĉar la lingvo estas kio fakte ĝi estas, kvankam la anatemo lanĉata konstante de la puristoj de la perfekta lingvo. Esperanto apartenas al la tuta homaro, ne al grupo de bigotuloj. Do, neniuj rajtas ĝin kateni.

Tio ne signifas, ke Zamenhof, la Fundamento, PIV kaj eĉ la Akademio ne havas ankoraŭ sian gravan rolon en la evoluo de nia lingvo.

3-A DETRUENDA MITO:

En esperanto ne ekzistas homonimoj.

Do, ni akceptu nian lingvon tian, kia ĝi estas, tian, kian nia tradicio kreis.

Oni nun rimarku du nomojn en esperanto, por konstati, ke, kvankam nia lingvo estas eble la plej logika, ĝi ne estas perfekta en sia logikeco:

terpomo – ĉu pomo prenebla el la grundo, kvazaŭ ĝi naskiĝus kiel melono?

okulvitro – ĉu la plastaj estas okulplasto?

Tiujn vortojn oni akceptu kvazaŭ ili estus unuradikaj, ĉar ne plu eblas forigi ilin el la lingvo.

Rilate la etnajn vortojn, kvankam ili apartenas al ĉiuj esperantistoj, ili dependas de la kreivo kaj de la kompetento de la esperantistoj de la koncerna etno. Do, la responso traduki kaj transliteradi portugaliajn geografiaĵojn kaj kulturaĵojn estas nia, de la portugaliaj esperantistoj.

Kelkajn el la esperantaj elportugaliaj vortoj oni devas restigi, kvankam eblus, ke ili estu pli adekvataj al la internacia lingvo. Tiaj estas vortoj kiel ekzemple *Taĵo*, la nomo de la rivero. Pri aliaj, kiel *fado* kaj *Porto*, oni vidu la envortarigitajn *faduo* kaj *Oporto* kiel erarojn korektendajn en postaj vortaroj. Rilate aliajn ankoraŭ ne asimilitajn vortojn oni devas krei ilin laŭ logika sistemo.

Inter la legendaj libroj pri la afero, la libreto de Délio Pereira de Souza, *Brazilaj Geografiaj Nomoj*, montriĝas aparte grava, por ni portugaloj, ĉar konsultante la libreton, oni deduktas la sistemon, laŭ kiu la aŭtoro transliteradis milojn da brazilaj geografiaĵoj en esperanton.



Foto: La aŭskultantaro (de Juliana Santos)

La sistemo kreata en la dua libro aludita en la komenco de ĉi tiu prelego, *Traduko kaj transliterado de portugaliaj nomoj al esperanto*, ne multe distiĝas de la libro de Délio, kvankam ekzistas kelkaj diferencoj.

Traduko kaj transliterado de portugaliaj nomoj al esperanto estas libro, kiu kreas, i.a., sistemon de transliterado el la portugala esperanten. Ĝi estas lignvika sistemo, kiu funkcias kiel matematika funkcio. Aŭ pli simple, ĝi estas kvazaŭ maŝineteto, en kiun oni metus porkojn, kaj en la alia flanko de la maŝineteto, oni ricevus kolbasojn. La porkoj estas la portugaliaj vortoj, la kolbasoj estas la esperantaj vortoj, kaj la maŝineteto estas la transliterada sistemo el la portugala esperanten, menciata en la verko.

Kompreneble, la vortoj aperantaj per tiu sistemo homonimos kun aliaj jam ekzistantaj. Kaj jen ĉi tie, aperas la neceso detrui la 3-an miton, laŭ kiu, en esperanto, ne ekzistas homonimoj.

Por pruvi, ke de ĉiam en esperanto ekzistas homonimoj, oni povus doni multajn ekzemplojn, sed ĉi tie oni menciis nur kvar el ili, laŭ diversaj originoj, kies diskuto kaj profunda analizo ne eblas ĉi tie.

Oni atentu pri:

kanono – grava principa regulo

kanono – larĝbuŝa pafilego

kanono – muzikaĵo laŭ kiu unu voĉo imitas alian

Jen tri signifoj por esperanta vorto, kiun neniuj diskutas.

muso – besteto al kiu tre plaĉas fromaĝo

muso – eta aparato por kontroli komputilon

La uzo de la sama vorto por la besto kaj por la komputilaĵo tute ne ĝenas la uzanton de esperanto.

esti – identiĝo

Mi estas Ĝoano (= *Mia nomo estas Ĝoano.*)

esti – lokiĝi

Mi estas hejme. (= *Mi lokiĝas en mia hejmo.*)

fari – agi

Ne faru tion! (= *Ne agu tiel!*)

fari – prepari

Mi faros kafon. (= *Mi preparos kafon.*)

Ĉiuj filologoj kaj lingvistoj scias tre bone, ke ne ekzistas lingvoj sen homonimoj. Tio ne signifas, ke oni stulte multobligu homonimojn senpripense. Tamen, oni akceptu ilin nature, tiel kiel gepatroj akceptas ĝemelojn. Oni ne forigu unu el ili; ĉu ne?

LA PARONIMOJ... LA DIABLO!

Fakte la paronimoj pli konfuzigas la homojn ol la homonimoj. Tamen, ili ne estas konfuzebaj, se oni uzas tiujn paronimojn ofte. Pro la ofta uzado, neniu konfuzas la jenajn vortojn: *fak'*, *fek'*, *fik'*, *fok'*, *fuk'*. Same, neniu konfuzas pro la vortoj *fak'*, *pak'*, *bak'*, *vak'*. Tamen, konfuzoj inter *proceso/procezo* kaj inter *stato/ŝtato* povas okazi, ĉefe se la denaska lingvo iel malhelpas pri la afero.

Kiel rilate la homonimojn, ankaŭ oni ne povas forigi paronimojn el la lingvoj, tamen, oni povas eviti ilin. Paronimoj estas eĉ pli evitindaj ol homonimoj, ĉar ili ĝenerale estas kaŭzo de pli da konfuzoj.

NETRADUKO, TRADUKO KAJ

TRANSLITERADO

Ni revenu do al la ĉefa afero, pripensante:

1. Kiam oni netraduku nomon?
2. Kiam oni traduku nomon?
3. Kiam oni transliteradu nomon?

1. PRI NETRADUKADO: ONI NE UZU FREMDAĴOJN EN ESPERANTO!

Legu la jenajn frazojn en esperanto:

Mi kutimas legi Shakespeare.

Mi kutimas legi Ŝekspiron.

Se oni ne tradukas la nomojn, do esperantisto devas scipovi legi en ĉiuj lingvoj de la mondo. Ĉu? Ĉu tio estas adekvata al lingvo internacia?

La shakespeare-a verko tuŝas min.

La ŝekspira verko tuŝas min.

Ĉu oni rezignu pri la ebleco vortkonstrui?

Oni sekvu la principon de neuzado de fremdaĵoj en esperanto. Ili sennecese malfaciligas nian lingvon, postulas specialajn talentojn por skribi kaj legi en ĉiuj lingvoj de la planedo, kaj malebligas la sistemon de esperanta vortfarado.

2. PRI TRADUKADO: KELKFOJE ONI TRADUKU LA NOMOJN

En la frazo ĉerpita el la reto:

"Papo Benedikto alvenas en Usonon; parolado ĉe la Blanka Domo."

pensu kiel stranga restus la frazo se oni ne tradukus la proprajn nomojn. Tiel kiel en la portugala, oni tradukas *White House* laŭ la senco, oni uzas la lando-nomojn en esperanto, ne en la originaj lingvoj, kaj oni uzas la esperantigon de la papo *Benedictus*. Do, oni asimilis la tri fremdajn nomojn al esperanto per traduka proceso. La samo okazas pri la sekvantaj frazoj:

Brazila Federacia Distrikto havas 5,802 km².

Don Johano La 6-a fobiis la krabojn.

3. PRI TRANSLITERADO: PLEJOFTE ONI DEVAS TRANSLITERADI LA NOMOJN

Kiam oni volas asimili etnajn kulturnomojn, ĝenerale oni transliteradas ilin. Tamen, kelkfoje oni havas la eblecon transliteradi aŭ traduki la nomon.

La nomo *Johano* estas unu el la plej oftaj en Eŭropo:

João, Juan, Jean, John, Johann, Ivan,

Γιάννης, Ιωάννης,...

Ĉu oni traduku ĉiujn al *Johano*, aŭ oni transliteradu ilin respektive al:

Ĝoano, Ĥŭano, Ĵano, Ĝono, Johano, Ivano, Jano, Johano,...

Nu, en esperanto, oni havas ambaŭ eblecojn, kaj ambaŭ devas esti uzataj.

La transliterado de nomoj havas la avantaĝon postrestigi la ĉarmon de la origina lingvo, kaj evitas la multobligon de la sama nomo en esperanto.

La traduko al ĝenerala nomo uzata en esperanto, kiel *Johano*, povas havi avantaĝojn en historiaj nomoj, kiel la nomoj de la reĝoj, pro pli facila rekonebleco de la nomo.

Laŭ la menciita sistemo de transliterado de nomoj el la portugala esperanten, kiu aperos en la libro *Traduko kaj transliterado de portugaliaj nomoj al esperanto*, la portugala nomo *João* estas tiel transliterata:

J -> Ĝ

ĉar Ĝ estas pli ofta kaj natura en esperanto ol Ĵ; simile al *jardim* -> *ĝardeno*; kvankam tiuj vortoj aperis en esperanto pro franca influo, la fakto estas, ke la portugala esperantisto al kutimiĝas al ili, kaj trovas tian rilaton inter la portugala kaj esperanto;

O -> O

pli taŭga ol U, ĉar la skriba formo estas la plej konstanta en la lingva uzado;

ÃO -> ANO

la nazala diftongo ÃO, elveninta el la latina AN(U/E) reprenas formon similan al la antikva.

Fakte en mezepokaj portugaliaj tekstoj oni trovas la nomon *Joane* por *João*, kaj la nuntempa adjektiva formo estas *joanino*.

Pri la sama afero, vivu ĉe *La Karavelo*, n-ro 4, p. 8, la klarigon pri la transliterado de *Camões* al *Kamonio*.

Jen listo de kelkaj aliaj transliteradoj el la portugala esperanten. La menciita libro enhavos multe pli da ili:

Lisboa – Lisbono (kp.: lisbonense)

Porto – Porto (*Oporto* estas anglaĵo)

Fado – Fado (*Faduo*: fobio al homonimoj)

Coimbra – Koimbro (C al K)

Freixo de Espada à Cinta – Frejŝo

Freixense – Frejŝano

Ribateĝo, Alenteĝo,

Mara Alenteĝo, Supra Alenteĝo,

Centra Alenteĝo, Suba Alenteĝo,...

RESUME...

1. Oni esperantigu ankaŭ la proprajn nomojn.
2. La esperantigo de la etnaj nomoj estas rajto kaj devo de la koncerna etno.
3. En esperanto ne ekzistas vortoj oficialaj kaj neoficialaj; simile al la aliaj lingvoj.
4. En esperanto ekzistas homonimoj; simile al la aliaj lingvoj.
5. Esperanto havas 121 jarojn da literatura kaj uzada tradicio, kiu sekure gvidas ĝian estonton. Ĝi jam de antaŭlonge ne estas lingvo-projekto, sed plenkura lingvo, kaj do, antaŭ ol krei, oni devas esplori la eblecojn de nia lingvo. Tamen, oni ne timu krei, ĉiam kiam necese.



Foto: La urba gazeto antaŭanoncis la okazon de la 24-a RPE.

DU NOVAJ LIBROJ

Post monatoj, espereble ne multaj, aperos du novaj libroj pri ĉi tiu afero:

Tradukmetodo de la portugala al esperanto – de João José Santos (TMPE)

Traduko kaj transliterado de la portugaliaj nomoj al esperanto – de João José Santos (TTPE).



Antaŭ Lisbono, trans la Taĵo, situas Alkoŝeto. Tie la Taĵo larĝas 17km. Pro tio, la fiŝkaptistoj nomas ĝin maro.

Alkoŝeto: Esperanto-gastama urbo

En la 4-a kaj 5-a de oktobro 2008, okazis denove la Renkontiĝo de la Portugaliaj Esperantistoj en Alkoŝeto. Ĝi estis la 24-a. Manke de la dezirata 1-a Kongreso de Portugaliaj Esperantistoj, la R.P.E. estas la plej grava esperanto-evento okazanta en Portugalio. Jen kelkaj fotoj de la bela Alkoŝeto, kiu ĉiam gastame ricevas la esperantistojn.

João José Santos

ALCOCHETE



La malgranda Alkoŝeto enhavas ĉ. 13,000 homojn.



Ole!
(Vidu LK 3, p. 17)




Ponto Vasko Gamo.
La plej granda eŭropa ponto.



Festo de la Verda Bareto (ĉapo).



Matrica Preĝejo de Alkoŝeto.



Kajo.



Urbodomo de Alkoŝeto.

www.esperantopt.com